

# La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

## EL LA ENHAVO

- Monda Turismo 14  
Jarkongreso Stockholm 16  
Magda Bohman 75-jara 18  
Usonaj Radioj 20  
Cu skandinavoj atingis Amerikon antaŭ Kolumbo 22  
Lingvoj en Vjetnamo 24


Abono 15 sv. kr.

Poŝtgiro: SEF 20 12

2

1971

59-a jaro



Chicago.



## LA REDAKTORO:


La frontpaĝa bildo kaj la artikolo de E. Rytenberg sur paĝo 20 temas pri Usono kaj montras kelkajn interesajn trajtojn de tiu vasta lando, kiu estas al ni kaj konata kaj nekonata. En 1972 ni havos ŝancon ekkoni ĝin iom pli, se ni partoprenos la Universalan Kongreson en la nordokcidenta parto.

Ci-jare tamen la UK okazos en Londono, kaj se vi ne jam anoncis vin estas nun urĝa tempo. En la antaŭa numero ni informis pri la skandinavia kongresvojaĝo kun unu-semajna restado en Irlando antaŭ la kongreso. Se vi volas resti post ĝi vi povos ekzemple viziti Skotlandon, en kies bela ĉefurbo kongresos la esperantista gejunularo.


Se vi ne vizitos iun kongreson sed tute private faros eksterlandan vojaĝon, ĉu vi tiam utiligos la eblecojn de Esperanto? La ĉi apuda artikolo de Erik Carlén informas pri nova organizaĵo, kiu havas la celon utiligi Esperanton kaj ĝin propagandi en la turismo. Tio estas grava kampo kaj la iniciato meritas ĉian apogon.

Sed mi bedaŭrinde havas la sperton, ke multaj svedaj esperantistoj nuntempe faras longajn vojaĝojn en fremdaj landoj sen fari eĉ la plej etan klopodon kontakti la esperantistajn organizaĵojn kiuj jam ekzistas. Ofte oni diras, ke bedaŭrinde ne estis eble viziti la lokan klubon aŭ telefoni al la delegito, ĉar oni veturis kune kun familianoj aŭ geamikoj, kiuj ne parolas esperanton. Tio estas malbona preteksto. Se oni vojaĝas kune kun neesperantistoj, kial ne almenaŭ iufoje doni al ili pruvon pri la praktika utileco de Esperanto. Ni ne nur parolu pri Esperanto. Se ni opinias ke nia movado ne sufiĉe rapide progresas, ni pripensu, ke eble la kulpo estas nia.

Tial ni kun plezuro legu la artikolon de Rytenberg. Kvankam li fakte faris komercan vojaĝon, li tamen trovis tempon por Esperanto. Modela agado!



Numero 2 59-a jaro  
MAR.-APR. 1971



de Erik Carlén, prez. de MT

Mi ne estas tute certa ke ni esperantistoj ĝenerale konscias kian grandan revolucion por la homaro tutmonda akcepto de facila, neŭtrala lingvo internacia alportus. Kulture, science, ekonomie, komerce, porpaco ni apenaŭ povas trotaksi tion. Ne estas dubo ke por tiu ĉi celo ekzistas nur unu taŭga lingvo, nia Esperanto, facila, vere internacia, nuancrica, elprovita kaj evoluinta dum preskaŭ 100 jaroj. Kara leganto, pripensu la diritajn vortojn! Ĉu ne estas nia morala devo ĉiel informi pri Esperanto, propagandi ĝin, mem uzadi ĝin kaj utiligi ĝin. Sed ĉiu agado por venkigi nian ideon devas esti prudenta kaj laŭ la principaro de Frostavallen, kvankam ni laboras en diversaj medioj.

Unu medio, en kiu ni ĝis nun tro malmulte laboris, estas la turismo. Kaj tamen ĝi estas kampo, kiu bezonas internacian lingvon kaj kie ni je minimumo da kostoj kaj laboro povas atingi rezultojn. La turismo hodiaŭ estas potenca "industrio", ankoraŭ kreskanta. La teknika evoluo de la transportiloj kaj la ĝenerala altiĝo de la vivnivelo ebligas tion. Homoj hodiaŭ vojaĝas multe pli ol antaŭe. Ĉiuj ankau havas libertempon, kiun multaj utiligas por vojaĝi al alia lando. Ni ĝojas pro tio, ĉar turismo tute kiel la Internacia Lingvo kontribuas al paco en la mondo.

Por utiligi Esperanton kaj propagandi ĝin en turismo estis fondita speciala turista organizaĵo esperantista dum la U.K. en Vieno. (Mi intence uzas tie ĉi la vorton "propagandi" kaj ne "informi". Ni bezonas kaj kaj kaj".)

Ĉu nova organizaĵo? Ĉu ni ne havas sufiĉe da tiaj en la movado, kiu certe malsanas pro surpapera organizaĵa elefantiazo? Mi bone komprenas kaj kun la plej granda hezito mi partoprenis la fondiĝon de tiu nova asocio en la movado. Sed ne timu: Tiu ĉi nova organizaĵo, kiu portas la fieran nomon Monda Turismo, nek intencas esti nur surpapera nek intencas malplenigi vian monujon sed nur helpi al vi dum vojaĝoj kaj fari ESPERANTON konata en turismaj rondoj.

### KIEL LABOROS MONDA TURISMO?

#### a) Recenzoj de turistaj aranĝoj

La turistaj entreprenoj, egale ĉu ŝtataj aŭ privataj, flugkompanioj, vojaĝaj agentejoj, hoteloj aŭ butikoj,

estas tre sentemaj por publikaj laŭdoj aŭ plendoj (= kritiko). Monda Turismo (= M.T.) celas krei, kunordigi, kontroli kaj publikigi tian kritikon (= recenzoj) pri turistaj aranĝoj. La publikigo povas unue okazi en la Esperanta gazetararo, ekz. sub la rubriko: "Monda Turismo informas". (Ni ja havas la bonegan gazeton de d-ro Unger, Turista Mondo, kiun ni kompreneble danke eluzos.) Esperantistoj poste povas publikigi tradukojn en la nacia gazetararo, kompreneble indikante Monda-n Turismo-n.

Monda Turismo povas ankaŭ skribi rekte al turistaj entreprenoj pri kritiko. Tiel la nova asocio povas fari ĝi ia tre utila sindikato por turistoj egale ĉu esperantistoj aŭ ne.

#### b) Rekomendo en turistaj entreprenoj

En butikoj en multaj landoj oni vidas afiŝetojn aŭ ŝildetojn kun rekomendo de tiu aŭ tiu turista organizaĵo. La teksto plej ofte estas en angla lingvo. (Diners Club, Anglo Ame-



rican Tourist Association, Language Service, por nomi kelkajn.) Mi ofte min demandas: Kial ni esperantisto ne povus fari same? Ni ja estas internaciaj kaj ni ofte vojaĝas. Per tia malgranda rekomendafiŝeto en butikoj, hoteloj, restoracioj k. t. p. ni povus vidigi inter alie la vorton **Esperanto** kaj la verdan stelon. La afiŝetoj surhavas la tekston: **Rekomendata de Monda Turismo. ESPERANTO.** La tri lastaj vortoj estos en la emblemo de la asocio. (Gi ankaŭ enhavas la verdan stelon. Vidu bildon!)

Se ni povos aperigi la afiŝeton de Monda Turismo en la plej bonaj entreprenoj turistaj ni faras bonan propagandon ankaŭ por nia lingvo propagando kiu bone subtenos la ĝeneralan informadon pri Esperanto. Samtempe la aktiveco per la rekomendaj afiŝetoj kreas konon kaj respektan por nia asocio Monda Turismo. Tio estas grava por ke ni havu influon en turistaj medioj. Nur tiam ni efike povas helpi al niaj membroj kaj aliaj turistoj.

Sed ne temas pri nura propagando. Devos esti vera rekomendado de absolute rekomendindaj entreprenoj. Do la celo ne estas iu amasdistribuo, sed tre limige oni donu la afiŝetojn al la plej bonaj kaj plej rekomendindaj entreprenoj. Se oni troe disdonas la rekomendojn, la tuta afero perdas sian sencan kaj memmortas.

Por efektiviĝi nian planon pri la rekomendoj ni devas havi kunlaboron kun bonaj esperantistoj, precipe en turistaj lokoj. Tio estus tasko por la Esperantaj kluboj kaj societoj, ĉar la loka propagando apartenas al ilia laboro.

#### c) Kofraj etiketoj

Ni preparas ankaŭ kofrajn etiketojn por niaj membroj. Tiel ni kreas veran kaŭzon por la esperantistoj ankaŭ uzadi siajn kofrojn por konigi nian lingvon al ŝoforoj, fervojistoj, personaro de flugkompanioj, portistoj, doganistoj kaj aliaj turistoj. La etiketo ankaŭ estas bona distingilo, kiam la kofro venas inter 50 aliaj. Ĉiu membro de la asocio ricevos kelkajn kofroetiketojn. Kiaj ili estos? Ili konsistos el la emblemo de la Monda Turismo (vidu la bildon).

d) **Aliaj labortaskoj**, kiujn ni estonte povos plenumi, se ni havos sufiĉe da membroj, estas ekzemple:

Stimuli kaj apogi la eldonadon de turistaj broŝuroj, libroj, atlasoj, mapoj, terminaroj en Esperanto. Ni esperas ke ni iom post iom povas iniciati aŭ mem aranĝi vojaĝojn por esperantistoj. La italaj esperantistoj montris al ni la vojon, kiam ili dank' al lerta kaj sindona laboro de ĝesinoroj Grattapaglia aranĝis la vere sukcesan krosadon sur Mediteraneo pasintan aŭtunon. Tiu turista aranĝo estis bonega propagando inter ĉ 1 000

## 44a kongreso de S. A. T.

(Parizo 31/7-6/8 1971)

La aliĝkotoj estas 50,00 FF por membroj, 67,00 FF por gastoj, ĝis la 31/3 1971 (speciala tarifo por junuloj de 15 ĝis 20 jaroj: 25 FF por SAT junuloj kaj 35 FF por junaj gastoj). Rabato por familianoj (5,00 FF por ĉiu familiano). Senpaga aliĝo por infanoj.

Loĝado okazos en komfortaj individuaj ĉambroj de la Scienca Fakultato en Orsay (elp. Orsé). Pensiono: 30,00 maksimume, kun tri kompletaj manĝoj inkluzive la trinkaĵojn.

Loko facile atingebla per subtera vagonaro ("METRO") kaj per aŭtomobiloj (vasta aŭtoparko).

Infankongreseto funkcios. Nepre enskribigu vian infanojn.

Informoj ĉe

**SAT — 67, avenue Gambetta —  
PARIS (20ème)**

Li ĉijara kongreso de "Centra Dana Esperantista Ligo" okazos la 1—2an de Majo en unu el la plej modernaj altlernejoj en Skandinavio: "LO-SKO-LEN" en Elsinoro. D-ro Ivo Lapenna honoros la kongreson per sia kunesto. Kongreskomitato: Svend Larsen, Wesselsvej 6, DK 3000 Elsinoro, Danlando.

neesperantistaj pasaĝeroj, kiuj dum tuta semajno povis konstati kiel bonege Esperanto funkcias praktike.

#### Membreco, estraro k. t. p.

Monda Turismo akceptas individuajn membrojn. La membreco validas por tri jaroj kaj la membrokoto estas 60 belgaj frankoj. Ni ankaŭ akceptas kolektivajn membrojn (t. e. Esperantaj grupoj, asocioj). Ĝis plue la koto por kolektivaj membroj estos la sama, t. e. 60 belgaj frankoj.

La kotizon vi povas sendi al la kassistino de MT, f-ino Maria Henquinez, 1171 St. Maartensdal, B-3000 Leuven, Belgujo, poŝtekkonto 9532.76. Por la kotizo vi ricevos membrokarton, kofroetiketojn kaj prospektojn se ili estos eldonitaj. Ne pensu ke vi ricevos malmulte por la mono. Vi ankaŭ ricevos la kontentiĝon subteni Esperanton en tute nova maniero.

Ĝenerala sekretario de Monda Turismo estas s-ro Nikola Nikolov, PK 45, Sofia, Bulgarujo.

**Erik Carlén**  
Prezidanto

**LA REVIDO  
DE  
STOCKHOLM**

**JARKONGRESO  
SEF**

**PENTEKOSTE  
1971!**

**Esperantokongresen 1971  
Gerdman  
Sibyllegatan 83  
114 43 Stockholm**



# PINGSTEN I STOCKHOLM

## SEF:s ÅRSKONGRESS

### LÖRDAG 29 MAJ

- 15.00 Kongressreceptionen öppnas.
- 17.00 Styrelsemöte SEF och SEJU.
- 18.30 Invigning.
- 19.30 Avresa med buss till restaurang Högloftet, Skansen.
- 20.00 Supé.  
Liten folkdansuppvisning.
- 24.00 Återresa till Malmen.
- 20.00 SEJU (Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo) årsmöte. Medborgarhuset.

### SÖNDAG 30 MAJ

- 9.30 SEF:s årsmöte.
- 14.00 Estradiskussion.
- 16.00 Facksammanträden, bl. a.: Esperantoförlaget (Eldona Societo Esperanto) årsmöte IPTEA sveda sekcio SEJU, forts.
- 20.00 "Distra vespero" med bl. a. dockteater, sång.

### MÅNDAG 31 MAJ

- 11.00 Avresa från Malmen med buss till Drottningholm.  
Kaffe. Besök på teatern.
  - 13.30 Återresa till Malmen.
- Deltagarkort fordras även för deltagande i enstaka arrangemang.

### LOKALER

**Hotell Malmen, Götgatan 49—51**

Tel. 08-22 60 80, 22 61 80.

Tunnelbana station Medborgarplatsen, tre stationer från T-Centralen.

#### Medborgarhuset

Tunnelbana station Medborgarplatsen.

#### Högloftet, Skansen

Buss nr 47 från Centralen eller nr 67 från Karlaplan.

Abonnerade bussar från hotell Malmen.

### MÅLTIDER

Det finns flera restauranger och barer runt Medborgarhuset. Följande är öppna under pingsthelgen: Ringbären, Göta källare, Kvarnen, Malmen m. fl.

### RABATT PÅ JÄRNVÄG

Tillsammans med deltagarkortet utsändes till deltagarna ett SJ-kort som berättigar till rabatt på järnväg inom Sverige.



### PRISER OCH ANMÄLNING

Deltagarkort .....	25:—
för SEJU-medlem .....	10:—
Dubbelrum .....	per natt 43:—
Enkelrum .....	per natt 51:—
Subventionerat ungdomslogi för SEJU-medl. per natt	10:—
Supé inkl. bussresa .....	40:—
Frukost .....	7:—
Bussutflykt inkl. kaffe ...	15:—

Anmälan sändes till Esperantokongressen 1971, Gerdman, Sibyllegatan 83, 114 43 Stockholm. Telefonkontakt Gun Gerdman, 08-60 49 72. Postgiro 50 74 61-2.

Sista anmälningsdag är 30 april 1971. Efter den dagen kan kommittén inte garantera att hotellrum kan reserveras.

## ANMÄLNINGS- BLANKETT

Anmälningsblankett till SEF:s årskongress i Stockholm, pingst 1971, fanns i förra numret av La Espero.

Ytterligare exemplar kan erhållas från Esperantokongressen 1971, Gerdman, Sibylleg. 83, 114 43 Stockholm. Telefonkontakt Gun Gerdman, 08 - 60 49 72.



La lingvaj fenomenoj enkadrigas en la socia fenomenaro. Sed meze de tiu socia fenomenaro, oni devas rezervi al ili apartan lokon; ĉar lingvo, kiel la komunikilo de la kulturo ne povas esti konsiderata kiel unu el ĝiaj plej malgravaj kaj sensignifaj aspektoj. La kulturo estas transdonita pere de ĝi, eble la kulturo devas eĉ submetiĝi al la kondiĉoj propraj kiujn proponas la lingvo.

Ĉu do lingvo lasus tian markon ĉe la kultura disvolvigo? Kiel, — kiome kaj kiusence — lingvo kaj kulturo rilatas unu kun la alia? Interne de grupo, kiomgrade la elekto de tiu aŭ alia lingvo gravas por la kultura disvolvigo de tiu grupo?

Helpe de la plej ĝisdataj sciencaj teorioj — en lingvistiko kaj en sociologio — ni klopodos skizi la respondon al tiuj problemoj, problemoj kiuj evidentiĝas ne nur en la kadro de la ĝenerala socio, sed ankaŭ interne de malgrandaj grupoj kaj de organizaĵoj. La teoria studo provizos nin je instrumentoj por pliprofundigi la studon de konkretaj kazoj — i. a. tiuj de la diversaj organizaĵoj reprezentitaj en la seminario. En ĉiu aparta kazo verŝajne aperos elementoj ne science pravigeblaj, sed nur ideologie, kio kondukos nin al konsciigo pri la ideologia aspekto de la lingva problemo.

La laboro estos plenumita ĉu pere de enketoj, ĉu pere de enkondukaj prelegoj de fakuloj (lingvistoj, sociologoj), ĉu pere de diskutgrupoj. Plejparte oni laboros en ĉi-lasta maniero; la grupoj estos aranĝitaj ĉu laŭ la lingvoj (por la lingvistikaj diskutoj) ĉu laŭ la celoj de la diversaj organizaĵoj reprezentitaj (por la ideologia aspekto).

Vizitoj al internaciaj organizaĵoj kompletigos la praktikan flankon.

Fine oni komune redaktos dokumenton evidentigante la konkludojn de la seminario. Tiuj konkludoj devus helpi la koncernajn organizaĵojn klare konsciigi — kaj pli ĝuste pritaksi — la ideologiajn kaj politikajn implicojn de la uzo de diversaj lingvoj kiel komunikrimedo.

#### Priskribo

Seminario pri Lingvo kaj Kulturo, 5 ĝis 12 septembro 1971, Strasburgo, Francio.

Partoprenantoj: Internaciaj junularaj organizaĵoj (Esperantistaj kaj ne-esperantistaj) kaj eventuale aliaj fakuloj kaj interesigantoj.

Laborlingvoj (verŝajne): Franca, angla kaj Esperanto.

Programo:

★ Enketo pri la lingva problemo interne de la ĉeestantaj organizaĵoj, kaj de junularaj organizaĵoj ĝenerale.

★ Enkondukaj prelegoj pri:

- Lingvo kaj kulturo: lingvistika vidpunkto;
- Lingvo kaj kulturo: sociologia vidpunkto;
- Lingvo kaj kulturo: ideologia vidpunkto.

★ Diskutgrupoj pri la diversaj temoj, kaj raportado de la grupaj rezultoj. Oni grupiĝos ĉu laŭ lingvoj (por lingvistikaj diskutoj), ĉu laŭ celoj de propra organizaĵo (por ideologiaj aspektoj).

★ Vizitoj al internaciaj organizaĵoj en Strasburgo, kaj studo pri iliaj soci-lingvaj problemoj.

★ Praktika studo pri soci-lingvaj problemoj de ĉeestantaj organizaĵoj.

★ Redaktado de seminariaj konkludoj.

Informoj: TEJO, NEJO-komisiono, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando.

#### SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

La komitato de la someraj universitataj kursoj decidis okazigi la unuan sesion de la SUK de 30a julio ĝis 27a de aŭgusto 1972 en la universitato de Lieĝo. La rektoro de tiu ĉi universitato disponigis al la komitato modernajn lekciojn kaj studentajn loĝejojn en la tute nova universitata kvartalo Le Sart-Tilman apud Lieĝo.

La celo estas apliki la Internacian Lingvon en universitata instruado.

La **programo** ampleksos lekciojn kaj praktikajn studojn en du sekcioj:

1. Lingvistiko,
2. MEDICINAJ SCIENCOJ,

por kiuj ekzistas jam tre konkretaj proponoj. Oni antaŭvidas vastan kaj varian kromprogramon. La unuopaj kursoj estos tiel aranĝitaj, ke eblos ankaŭ efika partopreno dum malpli ol kvar semajnoj.

La kondiĉoj de partopreno estos:

1. abiturienteco aŭ similnivela klereco,
2. minimuma aĝo: 17 jaroj, maksimuma aĝo: 40 jaroj.

La SUK-komitato decidis pri esceptoj.

La sola lingvo de SUK estos la internacia lingvo Esperanto.

**Korespondadreso:** Wim Jansen, Röntgenstraat 32 a, VLAARDINGEN 31 70, Nederlando.

★

#### GOTENBURGO 350-JARA

En kunligo kun la jubileo de la urbo okazos dum la 24—30 julio esperantista kunestado "Amika Internacia Rondo", kiun organizos la memstara agadgrupo INTER. Vidu apartan anoncon.

★

Forta volo.

"Mia edzo tute dekutimiĝis de la fumado."

"Por tio oni devas havi fortan volon."

"Mi havas."

★

La patro: Mi ne ŝatas la junan viron, kun kiu vi komencis societumi.

La filino: — Ne zorgu pri tio. Li ankaŭ ne ŝatas min.

## POSTSTÄMPEL

Brev som postas i en särskilt uppsatt brevlåda under SEF:s årskongress i Stockholm kommer att stämpas med en speciell poststämpel.

Om du vill ha ett brev med den stämpeln, eller om du vill sända ett brev med den stämpeln till någon du känner (och om du inte själv har möjlighet att posta det under årskongressen), gör så här.

Sänd 70 öre eller en svarskupong till Esperantokongressen 1971, Gerdman, Sibyllegatan 83, 114 43 Stockholm (postgiro 50 74 61-2) och meddela vilken adress som skall stå på kuvertet, så postar vi ett kuvert med reklam för kongressen. Men gör din beställning före den 20 maj!

## Anmäl Er

till kongressen i London (se sista sid.) och begär upplysningar om gruppresan dit (se särskild annons).

SEF





# Magda Bohman 75-jara



**MAGDA BOHMAN**

(Birgittagården, RIMBO)

iĝis 75-jara la 15-an de februaro 1971. Ŝi naskiĝis en Umeå, la plej norda universitata urbo de Svedlando. Ŝi estas tutmonde konata al la poeŝtanta esperantistaro sub la denaska nomo Magda Carlsson. Sian diplomon de popollerneja instruistino ŝi ricevis en 1917. Esperanton ŝi lernis en la kurso de T. Morariu en Säffle (Vermlando) en la jaro 1931 kaj baldaŭ ŝi superis sian instruiston en la majstrado de nia lingvo, suverene elstara poeŝtino de la Verda Olimpo. Valore ŝi kontribuis al la Sveda Antologio (1934, Stokholmo) kaj ni ĝuis sian delikatan kunlaboron en "Literatura Mondo". Ŝiaj ritmoriĉaj tradukoj popularigis plurajn melodiojn en Evangelia Kantaro (1952). En 1955 aperis ĉe Eldona Societo Esperanto ŝia **Sveda Poemaro** kun 72 poemtradukoj el 32 verkistoj. (Tre taŭga donaco ĉiamvalora de svedaj samideanoj por eksterlandaj amikoj.) W. Auld skribis en "The British Esperantist": "Per tiu ĉi volumo fraŭlino Carlsson eternigis sian nomon sur la Verda Parnaso." Kaj G. Waringhien recenzis en "Sennaciulo": "La lerteco de M. Carlsson en tiuj ĉi tradukoj estas mirinda, ŝia flua kaj klara lingvaĵo diafane redonas la animon de la originala poemo."

Stelo Magda ĉiam klare brilos sur nia literatura horizonto kaj dank-reŝone nestos en nia koro. Sanon kaj forton ni preĝas de Dio en la vivdaŭrigo por nia kara jubileantino.

Malpli konate estas, ke ŝi montris sian grandan talenton ankaŭ per originalaj poemoj en esperanto. Ni redonas en ĉi tiu n-ro kelkajn literaturajn juvelojn de M. Bohman-Carlsson.

Obo/Jo Iu

**MAGDA CARLSSON:**

## Libertempa problemo

*En viglokula taggazeto ĵus mi trovis,  
ke nun la sciencistoj preskaŭ plene kovis  
sekretojn plej subtilajn de l'aŭtomacio,  
kaj ke ni baldaŭ havos, leĝe kaj proklame  
laborsemajnon unutagan, hop, sezame,  
kiel fabelan frukton de la homa scio!*

*Agrable multa libertempo inventkuve  
verŝiĝos sur la teron milde, majapluve.  
Benate multa tempo por milito psika,  
por timon intensigi trans la oceanoj...  
Aŭ ĉu por planti rozojn, ludi kun infanoj,  
por ĉio varme mola, suna kaj amika?*

**GUSTAF FRÖDING:**

## Kio estas vero?

*Pilato diris: "Kio estas vero?"  
Respondis eĥo — la profeto ne.  
Enigmosolvon post fermitaj lipoj  
al mortoregno portis la hebre'.*

*Sed, dank' al Dio! Estas profesoroj,  
al kiuj tute klaras jam la ver'!  
Kaj multaj — ili nombras je legio —  
respondis al Pilato pri l'af'er'.*

*Sed ĉu ne strange? De la sola vero  
koloron ŝanĝas jen magi-asperg',  
ĉar kio veras en Berlin' aŭ Jena,  
nur estas stulta ŝerc' en Heidelberg.*

**NILS FERLIN:**

## Stratbildo

*Li estas bierfara direktoro.  
Parolas nun kun iu strata floro.  
Kaj ŝia elsuĉanto, pala ulo,  
rutine gvatas ĉe la stratangulo.*

*Li estas direktoro. Ruĝas vango.  
La vango ruĝas kiel sang-orango.  
Kontenta. Selfmade. Li ne konas ploron  
kaj ankaŭ ne gustumis la angoron.*

*Severaj steloj en la alt' rigidas.  
Mi lernis iam verson: Dio vidas.  
Okuloj diaj gapas stratan floron,  
eksploatiston kaj bierodirektoron.*

**SVANTE FOERSTER:**

## Brikoj

*Brikoj ricevis sian koloron de la sango  
de tiuj, kiuj mortfalis, defendante siajn  
urbojn.*

*Brikoj ricevis sian pezon  
de memoro kaj optimismo.  
Ni rekonstruas niajn urbojn  
por generacio, kiu iam kreos  
tempon senbatalan,  
tempon, kiam regos nur kresko kaj  
ripozo.*

*Ni portas la brikojn sur niaj manoj  
singarde, kvazaŭ ni portus infanojn  
aŭ la sekretan signon de la espero.  
Ni portas la brikojn en niaj revoj,  
konstruas kontraŭ cedanta fono  
de fumo kaj fulgo.*

*Ni rekonstruas, la brikoj havas koloron  
de l'sango de la ĝismortovunditoj.  
Ni rekonstruas niajn urbojn.  
En brikoj enestas la memoro de l'batalo  
por la rajto konstrui.*



# RECENZOJ

## Aventuroj en Mato Grosso

**J. H. Rosbach: Disko. Ciklo da skizoj**

Dansk Esperanto-Forlag 1970.  
110 p. Broŝurita. Havebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö.  
Sv. kr. 9: 75 + imposto.

Trovigas libroj kies titolo neniel instigas la fantazion sed kies kovrilpaĝoj kaŝas tre ĝuindan enhavon. DISKO estas tia kaj la legapetiton pliigas popaĝe.

Elirante de intertrakto pri eventuala vendo de dana ŝipo Disko, eluzita post multjara trafiko al Groenlando, la verkisto gvidas la leganton kroze tra Eŭropo, sekvante fadenojn, aŭ fadenojn de fadenoj, iel ligitaj al tiu ŝipo.

En la fino klariĝas ke la ŝipo fakte ne facile povos esti transformita, kiel estas la intenco, al sudfrancurba noktoklubejo. Sed jam ne interesas. Ni intertempe renkontis tiom da interesaj personecoj kaj tiklaj okazaĵoj en la inteligenta akompano de J. H. Rosbach, ke la ŝipon ni facile forgesis.

Verŝajne ni ĉiuj povus renkonti tiajn interesaĵojn ankaŭ memstare, por tiel diri, sed — mi vetas — ni preterpasus ilin sen vido kaj kompreno, ne povante elsuĉi la sukron el ili. Rosbach scias la arton eltrovi kaj malkaŝi tion, kio okazas malantaŭ la ŝajno sur la scenejo kiun ni nomas la mondo. Unu 'skizo' donas la semeron el kiu disvolviĝas la venonta. Sed almenaŭ unu historio finiĝas per mallevo de netravedebla vualo (domaĝe!): La strasburga stratulino, kiu tiel majstre scipovis ludi per la katedrala orgeno.

Tio kontribuas al pensoj pri la vereco de la rakontoj. Ĉu inventitaj aŭ ĉu spertitaj? — Ne gravas. 'La vivo estas interesa' vortigigas la simpla sed profunda konkludo de silentema fina amiko mia, kiam li finis longan mutan pripenson super glaso da acida lakto dum paŭzeto en mia hejmo inter siaj vojaĝoj. Kaj mi ekmemoras kiel mi iam sidis en malgranda gastejo en Eŭropo dum juna servistino, nepino de opera kantistino Berlino, deklamis al mi el Faŭsto de Goethe!

Nu, veraj esperantistoj estas senĉese scivolemaj pri la kunmondo, sekve vojaĝemaj, legemaj, rakontemaj. J. H. Rosbach estas eminenta reprezentanto de tiu gento, kaj lia skriba talento kaj lingva kapablo metas lin inter la plej bonaj verkistoj de distra literaturo.

**Ake Ahrén**

**Tra Lando de Indianoj**, de Tibor Sekelj. El la hispana esperantigis Ernesto Sonnenfeld. Revi-ziis la aŭtoro. Lingve kontrolis Bertil Nilsson. Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1970. 186 p. Broŝ. kr. 24: —, bind. kr. 30: — + imposto.

Denove nia samideano-esploristo entreprenis vojaĝon al regiono malofte vizitata de blankuloj — ĉi-foje en la mezo de Brazilo. Tie en la tropikaj arbaroj de Mato Grosso li kaj liaj akompanantoj tranĉas sian vojon por trovi indianajn tribojn, pri kiuj oni scias ke ili ekzistas, sed kiuj ankoraŭ estis nur sporade vidataj de civilizitaj homoj.

La rakonto estas verva kaj oni sekvas la etan ekspedicion kun granda intereso tra iliaj multaj streĉaj provoj atingi siajn celojn, t. e. trovi la 'karaĵaajn' aŭ 'javantojn', 'java-egojn' aŭ aliajn tribojn pli malpli sovaĝaj. Jam multaj antaŭaj ekspedicioj malaperis en la interno de la ĝangaloj. Sed Tibor kaj lia novtrovita kunulino Meri — kiu antaŭ la fino de la historio estas lia edzino — post multaj obstakloj venas al amikema tribo, vivas kune kun ili dum kelka tempo kaj revenas al la civilizacio riĉaj je spertoj kaj sen tro multe da gravaj vundoj.

Traleĝinte la libron mankas al mi koncepto pri la daŭro de la vagado. Alia sentebla manko estas la foresto de mapo, per kiu oni povus sekvi iliajn zigzagajn vojojn kaj iun bildon prezentante al la leganto la ekspediciulojn kaj iliajn 'samindianojn' (nu, mi scias ke tio igus la libron pli multekosta kaj jam sufiĉas la prezo). Estus ankaŭ valore trovi iom da statistikaj informoj pri la indianoj kaj listo pri kaj klarigo de neologismoj, kiuj inkludas bestnomojn k. s. vortojn ne troveblajn en ĉiu vortaro.

Ekz. mi ne scias kio estas 'ĵakareo' sed nun scias ke ĝi estas ne nur manĝebla sed ankaŭ bongusta besto. Mi ankaŭ lernis ke testudoj metas unufoje jare — dum unu nokto — 150 ĝis 220 ovojn profunde en lagborda sablo. Tio estas laŭ la aŭtoro vera trovaĵo (aŭ per lia nova vorto 'predo') por esplorvojaĝantoj, ĉar ilia bongusto estas eksterordinara.

Foje la aŭtoro miscitis la Bibliion dirante ke la tutnudaj indianoj ne portas la plej etan signon de io me-

P. S. Kaj DISKO vere ekzistis, kaj ekzistas nova ekzemplero. Mi iom esploris en Kopenhago antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi trafikis la reton al Godthaab tre vere. Kaj havas propran poŝtnumeron DK-3991.

moriganta 'la vinberfolion de Adamo' — laŭ mia memoro la edenaj indigenoj portis foliojn de figarbo.

Konklude: tre interesa legaĵo pri brule aktuala homgrupo, kies problemo survivi flanke de la civilizacio estas dubinda. Fine: mi tre bedaŭras ke libroj devas esti tiel multekostaj... **Sam**

### SOVETA UZBEKISTANO

Eldonis Kom. pri Int. Ligoj de Esp. de Sov. Uzbekistano. Tas-kent 1970.

Unua kajero en serio pri Uzbekistano. Informado pri interesa Soveta regiono ĉe la limo de la fabela oriento. Buĥara, Samarkand, jen urboj kies nomoj ankoraŭ tentas la imagon per fantaziaj bildoj el fora epoko. Sed la broŝuro tuj forviŝas tiujn bildojn... Ĝi temas pri la nuno, kaj la nuno konsistas el utiligo de eblecoj kaj riĉaĵoj, intensigo de la produktado.

Ĝis nun la vorto Samarkand estis vizio pri despota potenco, trezoroj kaj mistiko, Djingis-kan kaj Timur-lenk. Sed nun — vi ekscias ke Samarkand havas revolucian tradicion, obtuze murmuris tie uzinoj elvoman- te fridoŝrankojn. Kotonokampoj, kazernoj, flughaveno... Kaj la nova nomo de la fabela urbo, AFRASIAB, efike fortimigas ĉian romantikon. Jen la nuno, kaj kompreneble pli utilas al ni koni la realecon ol memori fantazian gloron el la estinto.

La kajero estas interesa, la lingvo estas klara kaj viva, la informado necesa por konigi la evoluon kaj la nunon. Tamen, leginte tiun-ĉi unuan kajeron oni jam demandas al si ĉu Lenin vere kreis ĉion... **S. A. J.**

### POR RECENZO

ni ricevis la jenajn novajn librojn:

**NOKTO DA TIMO**, tri noveloj de Bertram Potts. Dansk Esperanto Forlag.

**KANTOJ kaj ROMANCOJ** de Heinrich Heine. Tradukis K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Stafeto.

**HUMOROJ**. Nova Poemaro de William Auld. Stafeto.

**ETA VIVO**. Poemaro de Clelia Conterno Guglielminetti. Stafeto.

**SOLECO**. De Victor Català. Tradukis Josep Ventura I Freixas. Verko adoptita de la Hispana Esperanto-Federacio kiel Memoriga Libro de la 53-a U.K. de Esperanto en Madrid.

**Ni AKTORAS**. Tri komedietoj de Marjorie Boulton, Dansk Esperanto Forlag.

Recenzoj sekvos en proksimaj numeroj.



# USONAJ RADIOJ

## De E. Rytenberg

Kelkaj amikoj laŭdis mian raportaĵon el Japanujo aperintan antaŭe en LA ESPERO. Tial mi ekkuraĝas priskribi iom supraĵe miajn impresojn el mia lasta vojaĝo en Usono.

Unue mi flugis al Washington. Tio estis nun mia unufoja vizito en la landa ĉefurbo. Planita de francaj arkitektoj Washington estas la malplej tipa usona urbo. Kontraŭe, ĝi preskaŭ povus ekzisti ekz. en Eŭropo. Vera urbo-gardeno: multaj verdaĵoj, parkoj, floroj faras agrablan, ripozigan impreson. Ankaŭ ĉiuj vojoj kunligantaj la urbon kun siaj antaŭurbaj satelitoj estas ambaŭflanke ornamitaj per densaj arboj kaj herbejoj.

Post la unua kontakto kun la usona agentejo de nia sveda kompanio kaj rapida vizitado de la urbo mi flugis al la suda pinto de ŝtato Florida, banurbo Miami Beach kie mi restis dum tuta semajno ekspoziciante niajn sciencajn aparatojn dum la kongreso de "Amerika Psikologia Asocio" okazanta en tiu urbo. La vetero estis tiel varmega kaj krome tiel malseka kun 90% da humideco, ke oni evitis esti ekstere kaj klopodis resti interne kie, pro la aer kondicio, estis pli agrable. Ĉiumatene je la 7-a kaj vespere post laboro mi tuj malsupreniradis de la hotelĉambro rekte al la strando, sed eĉ en la Atlantika Oceano kie jam frue matene kaj vespere la akvo estis varma je 26° C oni ne povis trovi la sopiratan refreŝiĝon. Mi divenas kiel milda kaj plezura klimato tie devas regi dum la vintro. La urbo Miami mem ne prezentas ion interesan, ĝi konsistas el centoj da pli aŭ malpli luksaj hoteloj.

Kiam oni revenis denove al Washington oni lokigis min en bela kaj granda hotelo en la apudurbo Bethesda. La hotelo estis situita en vasta parko, sed ne havante aŭtomobilon oni estis tute izolita, ĉar al la plej proksima domaro estis pluraj mejloj (anglaĵ). Sed se oni estas individua membro de UEA oni ne timas izolitecon eĉ en Usono. Mi telefonis al d-ro T. Goldman, UEA-del. en Bethesda kaj la izoliteco forflugis. Li ne nur veturigis min tra la tuta regiono sed ankaŭ invitis min kaj kelkajn gesanojn al sia pitoreska vilao, kie en la altano, en la societo de lia simpatia familio kaj aro da gesamideanoj ni pasigis agrablan vesperon. Tutan dimanĉon s-ano Decal kaj s-ino Blaise, bona ekzemplo de fame belaj nigrohaŭtulinoj de Haiti, antaŭtagmeze kaj s-ano Davis kaj ĉarma studentino posttagmeze gvidis min al

ĉiuj plej ĉefaj vidindaĵoj en Washington: la Blanka Domo, Kapitalo, Pentagono, Lincoln- kaj Washington-monumentoj, militista Tombejo Arlington kun la tomboj de prezidento Kennedy kaj, je kelkaj metroj apude, de lia frato Robert. Tiu lasta tombo pleje impresigis min per sia simpleco konsistanta el nur ligna kruco kaj du vortoj: Robert Kennedy. Ni ankaŭ vizitis la novan konstruaĵon de WHO (Tutmonda Organizo de Sano) kie s-ano Decal kaj s-ino Blaise ambaŭ estas oficistoj.

Post la vaŝingtona regiono mi translokiĝis al la novjorka kie mi ekloĝis unue en Long Island en unu el miloj da moteloj (Motor inn) tipaj por Norda Ameriko kaj tial indaj esti priskribitaj por tiuj kiuj konas ilian aspekton nur el filmoj. Ili ĝenerale situas ĉe grandaj ŝoseoj. Ĉi eniras en la ĉambrojn rekte de la korto aŭ de eksteraj balkonoj konstruitaj laŭlonge de la fasadoj. La komforto estas kutime bona, ĉiuj ĉambroj havas banejon kaj televidilon kiu plej ofte funkcias malbone kaj la prezoj estas iom pli malaltaj ol en hoteloj. Por la semajnfino mi translokiĝis al alia hotelo en Manhattan. En Novjorko mi havis plezuron denove renkonti s-anon John Lewine kaj kelkajn aliajn s-anojn. Interesa estis iuvespere vagado tra Greenwich Village, fama centro de kipoj.

La densaj homamasoj similis al homamasoj en la Osaka Ekspozicio kaj estis kvazaŭ skatolo da sardenoj inter si moviĝantaj.

En Ĉikago estis por mi agrabla surprizo la kresko de esp-movado en tiu urbego. Kiam mi antaŭ 2 jaroj klopodis kontakti iun s-anon, mi sukcesis nur post pluraj telefonprovoj atingi pastron Wuest kiu afable metis sin al mia dispo. Nun, precipe dank' al la energia propagando de nur unu tute nova s-ano Kent Jones la movado nia ŝajnas serioze progresi.

Ne forgesu la specialajn kondiĉojn en la norda Ameriko kie la homo povas tramigri milojn da kilometroj antaŭ ol renkonti unuajn lingvajn malfacilaĵojn, kio faras ke la praktika neceso de lingvo internacia ne estas tiel akuta kiel ekz. en Eŭropo. En Ĉikago mi ankaŭ renkontis la sveddevenan s-anon Sandberg kiu invitis min al vespermanĝo en la "Klubo de milionuloj" kies membro li estas. Tie oni servas ĉiajn ajn drinkaĵojn tute senpage, kio plezure efikas la simpatian s-anon Jones kiu pli

kaj pli laŭte deklaris siajn... politikajn vidpunktojn.

De Ĉikago mi flugis al Montreal en Kanado por tramezuri tiun landegon de oriento al okcidento. Sed pri "Kanadaj radioj", se vi permesos, eble poste. De Vancouver mi tamen revenis al Kalifornio. En San Francisco mi vizitis kune kun mia malnova esp.-amikino Gigi Harabagiu originalan spektaklon: estis la kabaredo Finchio kun belaj "dancistinoj" kiuj ĉiuj iom post iom nudigante siajn torsojn montrigis esti... viroj. Persone mi ne sukcesis trovi ion amuzan en tia speco da "trompado" sed la cetera publiko evidente estis kontenta. En Los Angeles mi partoprenis la privatan vesperon en la gastama hejmo de ges-oj Kalmar kie ariĝis pluraj antaŭaj geamikoj. Inter ili nia ĉarma kaj bona Elenjo Glassen, sveddevena sed naskita en Usono, tamen perfekte kaj volonte parolanta svede. Ŝi petis min speciale saluti kelkajn geamikojn: s-anon Florin, Jack kaj Akiko kaj aliajn, kion mi jene faras kun plezuro. Ges-anoj Kalmar kiuj loĝis dum kelkaj jaroj en Svedujo, intencas reviziti nian landon dum venonta somero. Bonvenon al ili.

Antaŭ ol flugi hejmen rekte de Los Angeles mi ankoraŭ dediĉis lastan tagon al vizito en Disneyland. Tion mi ne bedaŭris. Ĝi estas ege interesa ne nur por infanoj. Estas malfacile priskribi Disneyland. Ĝi estas vasta parko kun multaj apartaj konstruaĵoj, kvazaŭ "gaja urbeto", io simila al Skansen kaj al kopenhaga Tivoli, sed anstataŭ budoj kun diversaj atrakcioj estis tutaj domoj tra kiuj, post aĉeto de specialaj biletoj, oni pasis per boatoj sur kanaloj. Interne ĉio moviĝis, kantis, ludis, terurigis, ridis, muzikis, dancis — nekredeble fea spektaklo prezentita nur de pupoj-robotoj kun gestoj ekzakte almezuritaj al voĉoj kaj fabele belegaj lumefektoj. Disneyland estas ankaŭ certe gajniga komerca afero se oni konsideras ke ĝin vizitas ĉiutage meze po 50 mil vizitantoj kaj ĉiu el ili elspezas tie almenaŭ 10—20 dolarojn...

Sed post 7 semajnoj mi vere jam sopiris hejmen. Ĉie bone, sed hejme plej.

**LA FOLIO** organo de Klubo Esperantista de Malmö, atingis sian 400-an numeron pasintan decembron. La unua numero aperis en majo 1931, kaj ĝi do baldaŭ estos 40-jara. Ni kore gratulas kaj bondeziras!



# ITALA VOJAĜO

Dum libertempa vojaĝo al la lago Garda en norda Italio antaŭ kelkaj semajnoj mi havis la okazon konatiĝi kun la esperanta grupo en Verona. Mi tiel imponiĝis de la aktiveco, kiu regis en la grupo, ke mi volonte volas informi pri tio al aliaj esperantistoj.

Tiu aktiveco dependas, ŝajnis al mi, je kelkaj treege aktivaj gvidantoj, i. a. D-ro Giovanni Marchiori (viceprezidanto de la itala federacio), lia edzino Dea Veronese kaj D-ro Giorgio Vandelli. Per diversaj manieroj, i. a. gazetaj artikoloj kaj arango de grupvojaĝoj, ili sukcesis informigi kaj entuziasmigi multajn homojn por esperanto.

Mi estis invitita al ilia kursvespero, kiu okazas ĉiuvendrede, kaj estis prezentita por la partoprenantoj. En la kursoj partoprenis ĉ. 160—170 personoj en 6 diversaj rondoj, la plej multaj gejunuloj. 3 el la rondoj estis por komencantoj kun 30 personoj en ĉiu.

Fakte mi havis bonŝancon, ĉar ĵus ĉi tiun vesperon oni ankaŭ aranĝis por komuna aŭtobusvojaĝo al Florenco venontan dimanĉon. Anoncis sin pli ol 35 personoj. La intenco estis, ke en Florenco en la stratoj ĉie en la urbo disdoni flugfoliojn, 5.000 mi kredas, kun informoj pri la lingva situacio entute kaj pri esperanto. Samtempe oni informigis la gazetaron kaj anojn de la urba konsilantaro. Ili ankaŭ presigis specialan folion por sendi al membroj de la urbaj estraroj de aliaj urboj en Italio.

Alian iniciaton mi volas mencii. En februaro 1970 naskiĝis en Verona EŬ. E. F., Signifas Eŭropa Esperanto Federacio. Ĝi havos ĉefe du taskojn. 1. Kunordigi la agadojn de la eŭropaj landaj asocioj por ke esperanto farigu la ĉefa internacia lingvo en Eŭropo. 2. Kunlabori kun UEA por naskigi aliajn kontinentajn federaciojn en Azio, Afriko, Norda Ameriko, Suda Ameriko kaj Aŭstralio.

Personoj, kiuj interesiĝas pri la eŭropa lingva problemo kaj ĝia solvo, skribu al la prezidanto de la nove naskita federacio D-ro Giorgio Vandelli, Via N. Mazza 42, 371 00 VERONA, Italio.

Märtha Andréasson



Ni aĉetis plurajn memoraĵojn en Italujo, sed jam dum la hejmenvojaĝo la patro eltrinkis du el ili.



## EN FRAGA?

Har Ni lăst Tibor Sekeljs nya reseksildring frăn Sydamerikas djungler — TRA LANDO DE INDIANOJ — ? Aldeles nytkommen. Den măste Ni lăsa. Se annons.

# TEJO EN EDINBURGO



Edinburgo en Skotlando estas la loko de la 27-a Internacia Junulara Kongreso. La datoj: 8—14 de aŭgusto 1971.

La kongresa komitato prezentas la kongreson tiel:

Ĉiujare ni kuniĝas. Sen baroj ni kultivas nian hororan malsanon — espero.

1971, ni kunestos en Skotlando, en Edinburgo. Urbo de novklasika ĉarmo, ejo de la fama arta festivalo

(post nia kongreso). Kore de tiu belstila urbo, okazos la 27a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Edinburgo: la ĉefurbo de Skotlando kun multe da famaj monumentoj, butikoj, muzeoj, novklasika arkitekturo ktp.

Junularo kaj kulturo — ĉirkaŭ tiu motifo okazos plena programo — ekskurso, balo, kunsidoj, konkursoj, bankedo, diskutoj, ceildh (skota fest-vespero). Ĉio en komfortega, moderna studenta domo, meze de la urbo sed en trankvila, belproportia strato.

## LONDON LOCKAR

Som SEF tidigare meddelat ,blir det även i år en skandinavisk gruppresa till esperantovärldskongressen i LONDON.

Herr och fru Kühlmann, Köpenhamn, blir reseledare. Vălkănda.

**Lördagen den 24 juli** reser gruppen med flyg till **Irland**. Det blir bad, vila och utfărder till Dublin och irlăndska landsbugden.

**Flyg till London** och kongressen.

**Lördagen den 7 augusti** Hemresa med flyg.

Skriv efter informationer och anmălningsblankett till gruppresan. Det gôr man hos **s-ino Ester Andrén, Ryttmăstaregatan 12, 217 52 Malmô**. Vi sänder ut informationerna, să fort de är fărdiga. Dessfôrinnan kan năgra uppgifter ej lămnas.

Anmăl Er till kongressen och fôlj med pă gruppresan.

SEF



# Ĉu Skandinavoj atingis Amerikon antaŭ Kolumbo?

## 3-a parto

Per tiu ĉi tria parto finiĝas la artikolaro de HUGO LÖFGREN pri tiu ĉi temo. Ni publikigis la artikolojn ne pro tio, ke ni en soviniisma fiero volas prui, ke nordlandanoj trovis la amerikan kontinenton longe antaŭ la sud-eŭropano Kristoforo Kolumbo, sed pro tio, ke ni volas emfazi, ke la historio de la homaro estas kvazaŭ vasta tereno, ankoraŭ nur parte esplorita.

La artikoloj atestas ankaŭ pri la eterna aventuremo, esploremo kaj vojaĝemo de la homoj, ecoj, kiuj en niaj tagoj igis la homon eĉ forlasi la teran atmosferon kaj elpaŝi en la senliman Universon.

Hugo Löfgren esploris kaj kolektis plurajn artikolojn, kaj li faris vere tre zorgan kaj detalan esploradon. Pro manko da spaco ni devis bedaŭrinde ekskludi eĉ gravajn partojn. Se iu el niaj legantoj havas specialan intereson pri la temo, ni volonte sendos al li fotokopion de la kompleta origina teksto de la aŭtoro.

### KIU ĈIZIS LA RUNO-GLIFAN ŜTONON EN KENSINGTON?

En novembro 1898 la svedo Olof Öhman okupiĝis per faligado de arbo en sia bieno en Kensington en la okcidenta Minnesota. Li praktikis metodon, kiun li lernis en Svedio. Li ĉirkaŭfosis la arbon kaj dehakis ĉiujn elstarantajn radikojn. Poste li aplikis ŝnuregon alte sur la arbotrunko kaj la alian ekstremon de la ŝnurego kun pulio al malsupro de alia arbo. Kiam la arbo estis falinta montriĝis ke al ĝia radikaro fiksiĝis granda ŝtono (Ĝiajn mezurojn mi nenie trovis). Forpreninte la ŝtonon Öhman observis ke en ĝia plata parto estas longa enskribo en glifoj, kiujn li ne sciis legi. Li montris la ŝtonon al sia najbaro, norvego Nils Flaten, sed nek ankaŭ li rekonis la skribon. Flaten rakontis en la urbo Kensington pri la trovo. Oni opiniis ke estas en la trovloko kaŝita trezoro, kaj ke la skribo estas priskribo de ĝi. Kun permeso de Öhman oni fosis ĝis 3 met, sed nenion trovis.

Oni transportis la ŝtonon al Kensington, kie ĝi estis ekspoziciita en bankoficejo. Fine kopio de la glifoj atingis la arkeologian profesoron en Oslo, Olaf Rygh. Li deklaris ke la ŝtono estas ĉizita per runoj, sed ke ĝi ne estas malnova. La teksto estas verkita de sved-usonano, kies lingvo amerikaniĝis. La ĉizinto ne multe scias pri runoj. Post tiu deklaro silentiĝis pri la Kensington-ŝtono. Öhman reprenis ĝin al sia bieno.

En 1907 juna historiisto H. R. Holand, venis al Öhman. Li interesiĝis pri la ŝtono kaj Öhman donacis ĝin al li. Nun ĝi estas en muzeo en Kensington. Holand studis runojn, kaj laŭ li oni legas sur la ŝtono: "8 göter ok 22 normen po oppdagelsefärd fro Vinland of west. Wi hade laeger wed 2 skär en dagsrise norr fro deno sten. Wi war ok fiske en dagh. Aepter wi kom hem fan 10 man rode af blod og ded. AVM fraelse av illu. Har 10 mans we hawet at se aeptir wore skip 14 dagh rise fro deno ö. 1362." (Ni

estas 8 göter [de sudsvedio] kaj 22 norvegoj en esplorvojaĝo en Vinland okcidenten. Ni bivakis ĉe 2 rokoj en lago unu tagetapon norde de ĉi-ŝtono. Iun tagon ni forestis por fiskapti. Hejmenveninte ni trovis ke 10 viroj estas ruĝaj pro sango kaj mortaj. Ave Maria, savu nin de malbono. Ni havas 10 virojn ĉe la maro por varti niajn ŝipojn 14 tagetapojn de ĉi-insulo. 1362.)

Holand publikigis sian tradukon en la norveg-usona gazeto Skandinavien en 1908. Li opiniis ke la ŝtono estas aŭtentika kaj ke ĝi koncernas al sved—norvega esplorvojaĝo de la tempo de la sved—norvega reĝo Magnus Erikson. Post tiam scienculoj akre diskutis ĝian aŭtentikecon. Skandinavaj ekspertizistoj pri runoj plejparte opinias ke la ŝtono estas falsaĵo, sed amerikaj ekspertizistoj plejparte opinias ĝin aŭtentika.

La ŝtono mem estas enigmo. Ne sufiĉas diskuti ĉu la ŝtono estas falsa aŭ aŭtentika. Unuavice oni devas klarigi ĝian estigon. Se ĝi estas falsa, kiu faris la falsaĵon? Kaj kial oni enterigis ĝin? Kaj se ĝi estas mal-falsa, kiel ĝi povis veni ĉi tien 1600 km de la Atlantika bordo? Ni unue aŭdu tiujn, kiuj opinias ĝin falsa. Oni dubas pri ĉio en ĝi, la vortoj kaj la enhavo de la teksto. Koncerne la runojn oni fakte ne povas kompari ilin kun la klasika runo-futarko (Aboco). Dum la 300 j. post tiu tempo la futarko ŝanĝiĝis. Jam en 12a jarcento la latin-glifoj komencis anstataŭi la runojn ĉe la akademianoj, sed la runojn ankoraŭ uzis la ordinaruloj, sed pliajn el la runoj en la Kensingtonŝtono la ekspertizistoj ne volas akcepti. Same ankaŭ pri ciferoj, kiuj estas influataj de latino. Unu el la kritikantoj, la dano E. Moltke, diras tute prave: Ni nun atingis al limregionoj de la duboj, kiu karakterizas ĉi-ŝtonon. Ŝajnas ke la futarko ne estas de 14a jarcento, sed tion estas neeble prui.

La kritikantoj atakas tiajn nociojn kiel "mans", "from, ded, illu, opda-

gelse". Sed vere estas ke "mans" (viroj) kaj "ded" (mortaj) aperas en svedaj skriboj de 14a jarcento. "Illu" estas formo de "plago, doloro", kaj ĝin ni trovas en pestopreĝo de post la "Grand-pesto". "Hjälpe oss Gud och Maria mö och fräls oss alla af illu" (Helpu nin Dio kaj Maria fraŭlino kaj gardu nin ĉiujn de malbono.) Ankaŭ la nocio "oppdaga" (malkaŝi) ekzistas, sed "opdagelsefärd" oni ne volas akcepti. La nocio "from" estas tipa angla vorto.

La sveda runo-ekspertizisto, Sven B. F. Jansson (Run-Janne), kiu estas kritika, reagis al la nocioj "fan 10 man rode af blod og ded". Li opinias ke la nocio "ded", al kiu mankas aliteracio kun "röde", devas esti almetata de posta falsanto. (Devus esti: "döde" kaj "röde" = mortaj kaj ruĝaj). Eble la ĉisinto devis hasti kaj forgesis alliteracii. Eble estis al li pli urĝe raporti ol rimi. La nocion "göter" oni ne volas akcepti. La esprimo "dena ö" (ĉiinsulo) por la bieno en Kensington estas duba, sed geografoj diras ke je tiu tempo estis tie kastoraj laĝetoj. Oni devas pripensi ke literumado je tiu tempo ne estis normigita. Niaj oficialaj skriboj de tiu tempo estas skribitaj de kleruloj. Kiel je tiu tempo parolis ordinaraj homoj ni ne scias. Sed kiu do ĉizis la runojn? Olof Öhman ni tuj povas ekskludi. En la lasta defend-skribo de Holand estas menciite iu tro-diboĉinta sveda pastro, Sven Fogelblad. Li iam estis pastro en Svedio, sed estis eksigita kaj migris al Usono kaj tie li vagabondis inter svedaj koloniistoj. En sia dorsosako li havis libron, kie la futarko estis priskribita. Estis "Svensk Grammatik" de C. J. L. Almqvist, kaj tiun libron li lasis en Kensington kiam li estis tie en 1860. Laŭdire li estris latinon kaj futarkon. Li naskiĝis en Västergötland, kaj eble tial li mencias "göter" antaŭ "normen". (Noto de tradukinto: Ĉu la runoj en tiu libro estas de la sama tipo kiel tiuj en la ŝtono? Certe tiu libro estas havebla en iu biblioteko.)



Sed tio nur estas indikoj. Kial Fogelmark kaŝis la ŝtonon? Se li vere faris ĝin?

La defendantoj de la ŝtono havas klarigon. Ili montras al letero de la reĝo Magnus Erikson al sia fidulo Paul Knutsson de 1354. Tiu Knutsson antaŭe estis komisiita elekti por si taŭgajn personojn por ekspedicio, kiu sekvu la reĝajn komerco-ŝipojn al Groenlando. Ilia komisiio estu firmigi la kristanismon en Groenlando, kio reale estis: kontraŭbatali la eskimojn. Ni ne havas pliajn noticojn pri tiu ekspedicio, kaj oni eĉ dubas, ĉu ĝi ekiris. Holand kaj aliaj tamen diras ke reĝa ekspedicio iris al Groenlando, kaj ke ĝi de tie daŭrigis al Vinlando por serĉi la malaperintajn kaj herezigintajn anojn de la okcidenta distrikto. La indikoj al tio estas malklaraj. Arĥepiskopo Olaus Magnus rakontas en "Historia de gentibus septentrionalibus" (La historio de la nordaj gentoj) 1555, ke li en la episkopa preĝejo en Oslo vidis eskimajn kajakojn (kanotoj) prenatajn de ekspedicio al Groenlando en la tempo de la reĝo Håkon (1355—1380). Laŭ kalkuladoj de Holand la ekspedicio venis al Groenlando en 1356, kaj postan jaron ili daŭrigis al Vinland. Estis 30 viroj en du gracilaj velŝipoj. En 1361 ili atingis al Hudson Bay, kaj en la estuaro de Nelson River ili bivakis. Ĉi tie ili ambiguis: Ĉu ni reiru, aŭ ĉu ni trovas alian eliron sekvonte la riveron suden? Kaj la rezulto estis: En la printempo 1362 ili partigis en du grupojn. 10 viroj restis ĉe unu el la ŝipoj, kaj la alia ŝipo velis en Red River suden.

Pri tio ni ne havas pruvojn, sed Holand montras al indikoj. Laŭ la supozita vojo de la ekspedicio, de Winnipeg, tra Nord-okcidenta Minnesota oni trovis 13 truojn en la rokoj. La truoj estas de antaŭ-kolumba tempo. Ĉi tie ili bivakis kaj al fera ringo en la roko ili fiksis la ŝipon kun la poŭpo fiksita per ankro. En Cormorant Lake estas la lasta truo, pri kiu loko la runskribo diras: Ni bivakis ĉe du rokoj en akvo unu tage-tapon norde de ĉiŝtono. Oni ne surterigis la ŝipojn por povu pli rapide malaperi. Ni ion trovis en Minnesota, kio laŭ-supoze estis altaro. Supoze ankaŭ pastro kunestis?

La plej interesa indiko pri la ekspedicio estas de monako Nicholas de la monakejo Lynn en Norfolk. Tiu monako en 1360 skribis kajeron pri veturo, kiun li faris fore en nordo en nekonata maro, kiun li nomas Mare Sugenum, kaj kiu laŭ priskribo, supoze estis Hudson Bay. La kajero, kiun li titolis "De Inventione Fortunata" (La fortuna trovo) nun estas malaperinta, sed estas priskribita de la kartografo J. Ruysch, kiu mortis en 1500. Nicholas sukcesis, laŭ Ruysch, konstati la magnetan poluson en Mare Sugenum. De la vetu-



WILLY BRANDT

#### RECENZO

**Dratwer, Isaj (komp.).** Pri internacia lingvo — dum jarcentoj. Wembley, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Broŝurita Mendeblo de Eldona Soc. Esperanto, Fack, 200 42 Malmö 7. 10: 50 kr. + imposto.

ro li rakontas ke Nicholas unue venis al du insuloj, kiuj estis loĝataj, poste al du aliaj, kiuj estis senhomaj kaj ĉirkaŭataj de altaj montoj, kaj ĉi tie komenciĝas Mare Sugenum, kaj ĉi tie ne plu funkcias la kompasoj. (Ferdinand Columbus rakontas ke lia patro vidis la kajeron de Nicholas antaŭ ol li ekiris por trovi Amerikon). Nicholas notas aferojn de Mare Sugenum kiuj supozigas ke li vidis la maron de ferdeko, kaj ke li nenie albordigis. Sed tio, kion li rakontas pri fluoj kaj vorticoj kiuj malfaciligas veladon, la altaj montoj kaj la ĝeno ĉe la kompasoj akordiĝas al realo. Holand opinias ke la monako Nicholas kunsekvis la sved—norvegan ekspedicion, kaj ke li estis unu el la 10 viroj kiuj restis ĉe la ŝipo en Hudson Bay. Tutan vintron ili atendis siajn kamaradojn, sed en la somero 1364 ili reiris al Groenlando kaj de tie al Norvegio.

En 1364 holandano J. Cnoyen rakontas en letero de Norvegio ke aro de 8 personoj, inter kiuj estis 2 pastroj aŭdiencis ĉe la norvega reĝo. Inter ili estis Nicholas de Lynn. Ili revenis de veturo al la nordaj regionoj. Laŭ Holand tiuj 8 personoj estis la restaĵo de la ekspedicio, kiun la reĝo sendis antaŭ multaj jaroj.

Sed kian sorton spertis la 10-opo, kiu restis poste la ekstermo de aliaj 10? Unu el ili ĉizis la ŝtonon. Sed poste ili ĉiuj malaperis. Eble ankaŭ ili estis murdataj? Eble ili trovis la groenlandanojn? Eble indianoj, murdinte la virojn, terenfosis la ŝtonon kiu havis mistikajn figurojn?

#### WILLY BRANDT OM DET INTERNATIONELLA SPRÅKET

"Språkens olikheter är det svåraste hindret för folkens inbördes vänskap och samarbete.

Det internationella språket Esperanto strävar sedan länge med framgång att bryta detta hinder. Esperantos framgångar har erkänts av UNESCO, och FN understryker att man måste fortsätta den av dr Zamenhof började verksamheten.

Måtte förbättrandet av de internationella förbindelserna bli en helig plikt för varje politiskt aktiv medborgare.

Vänkskapliga förbindelser mellan folk av olika nationer underlättar för politikern att fullgöra sin uppgift: arbeta för fred."



La nomo de Esp. veterano Dratwer iĝis klasika en Esperantujo; ĝi ne bezonas plian rekomendon.

Ci tiu nova, 144-paĝa libro eldonita de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) enhavas eldirojn aŭ skribaĵojn de pli ol 200 fame konataj personoj kaj instancoj pri la lingva problemoj aŭ pri la Internacia Lingvo mem: de Abdu'l Baha ĝis Zamenhof, de Descartes ĝis Willy Brandt. Oportune dividita en sekciojn (Filozofoj, Verkistoj, Sciencistoj ktp.), kun kronologia ordigo en la unuopaj sekcioj kaj kun alfabetaj indekso de la tuto, la verko donas samtempe interesigan legaĵon kaj imponan argumentaron por informado pri Esperanto.

Ĉu vi scias, kion diris pri la Internacia Lingvo homoj kiel Einstein, Hitler, Tito aŭ Robert Kennedy? Jen citaĵo el eldiro de la germana kanceliero Willy Brandt.

Ni publikigas la eldiron en sveda traduko por nialanda publiko kaj opinias, ke ĉiuj eldiroj en la libro de Dratwer devus enhavi **ankaŭ la originalon en nacia lingvo**, el kiu fontis la Esp-a traduko.

Io Iu

Ankoraŭ havebla:

### SVEDA POEMARO

74 el la plej famaj poemoj de la sveda literaturo (Tegnér, Karlfeldt, Gullberg, Ferlin, Taube kaj aliaj).

Tradukis:

Magda Carlsson-Bohman

Prezo 6: — krj + imposto

**Eldona Societo Esperanto**

Fack, 200 42 Malmö 7



# LINGVOJ EN VJETNAMO

Tium ĉi interesan artikolon de R. L. HARRY, Ambasadoro de Aŭstralio en Sajgono kaj ankaŭ konata esperantisto, ni permesis al ni ĉerpi el **THE AUSTRALIAN ESPERANTIST**.

## La Ĉinoj

En la ĝemelurbo de Sajgono—Cholon — oni vidas ke estas granda enloĝantaro Ĉina en Vjetnamo. Kiel aliloke, la Ĉinoj en Cholon estas komercistoj bankistoj k. s. Ili ankaŭ havas bonegajn restoraciojn. Ili konservas la Ĉinan lingvon kaj la Ĉinan skrib-sistemon. Mi havas multajn Ĉinajn amikojn en Sajgono — kun mia edzino mi ofte tagmanĝas en hejmoj kie la Ĉina estas la familia lingvo. Plejparte la Ĉinoj estas ŝtatanoj de la Respubliko de Vjetnamo kaj por komercaj celoj lernas la Vjetnaman, sed en iliaj propraj lernejoj iliaj infanoj, aldone al siaj Vjetnamaj studoj, studas la klasikajn Ĉinajn verkistojn. Estas ĉirkaŭ miliono de tiuj du-lingvaj Ĉinoj. Multaj iras al Tajvano (Formoso).

## La Vjetnama Lingvo

La dialekto, kiun la Vjetnamanoj kunportis el Ĉinujo, dum la jarcentoj apartiĝis kaj fariĝis la lingvo Vjetnama, lingvo de poetoj kaj verkistoj. Pro tio; ke dum longaj periodoj Vjetnamo estis sub la Ĉinaj Imperiestroj, ĝi ricevis grandan parton de sia kulturo el Ĉinujo kaj multajn vortojn por esprimi novajn ideojn. Kiel la Angloj post la Romia konkero uzis multajn latinajn vortojn, tiam post la Normana konkero adoptis latinajn radikojn el la Franca lingvo, tiam en Renesanca kaj moderna epokoj pruntis senpere el la klasika latina lingvo, tiel oni trovas en la Vjetnama tavolojn de ĉinaj radikoj. Estas multaj sinonimoj—po unu el Ĉina deveno kaj unu indiĝena.

Krome komplikas regionaj dialektoj, aŭ almenaŭ akcentoj, kiuj klare

diferencigas inter la Vjetnama el la nordo kaj la Vjetnama en la sudo, inter nordulo kaj sudulo. Tiuj diferencoj estas negravaj, tamen ili kreas ĝenajn problemetojn en la sudo, kien preskaŭ miliono da antaŭaj loĝantoj en la nordo fuĝis post la instalo de la "Demokrata Popola Respubliko" en Hanojo en 1954. Por fremdulo tio estas tikla problemo, ĉar multaj instruistoj estas el la Univ. de Hanojo, kaj mi mem, kiam mi lernis la Vjetnaman, akiris la nordan akcenton. Kombino de nur elementa lingvoscio kun norda prononco ofte faras mian paroladon nekomprenebla por kamparano en la Mekonga delto.

La Vjetnamanoj posedis ĉarman lingvon kaj interesan literaturon kiam alvenis la Francaj misiistoj, komercistoj kaj soldatoj. Ĉi tiuj trovis la lingvon tre malfacila pro la kvin tonoj kaj la ideograma skribado. Alexandre de Rhodes inventis sistemon de skribo per latinaj literoj kun super-kaj subsignoj por indiki tonojn kaj vokalajn nuancojn. Tio faciligis lernadon. Tamen la lingvo restis trege malfacila por Eŭropanoj; nur malmulte da alilandanoj scipovus la Vjetnaman. Pro tio — kiel diris al mi la ĉefo de la Instituto Pasteur en Sajgono — kiam Vjetnamano iras ekster sia lando li estas muta, surda, se li ne lernis unu el la "grandaj" lingvoj. Dum la du pasintaj jarcentoj la Vjetnamanoj grandskale devis lerni fremdajn lingvojn.

## Vjetnamanoj lernas la Francan

La Francoj instruis al la konkeritoj sian lingvon por faciligi administradon kaj pli altan edukadon de la enloĝantoj. Ne ĉiu posteno aŭ ĉiu profesio estis atingebla por la Vjetnamanoj, sed multaj lernis la Francan lingvon, kelkaj eniris universitatojn en Francujo aŭ poste en Hanojo kaj fariĝis kuracistoj aŭ farmaciistoj. Aliaj fariĝis oficiroj en la Franca armeo, kie ili Franciĝis, aŭ edziniĝis kun Francoj. Fine de la Franca periodo, dekmiloj da Vjetnamanoj parolis la Francan kiel Francoj, kaj eble milionoj havis utilan scipovon.

Post la sendependiĝo en 1954 la Vjetnamanoj ŝanĝis la nomojn de multaj stratoj — Libereco, Justeco, Revolucio, aŭ honore al Vjetnamaj herooj. Sed oni konservis kelkajn Francajn nomojn, ekz. Duong Pasteur (strato Pasteur), kie situas la Loĝejo de la Aŭstralio Ambasadoro, mia hejmo.

Multaj Francaj komercistoj kaj instruistoj restis en Vjetnamo, kaj multaj Vjetnamaj familioj daŭre parolis France kaj sendis siajn infanojn al la liceo en Sajgono aŭ al Pariza Universitato.

La Franca registaro finance subtenas lernadon de la Franca per la Franca Instituto kaj Franca Alianco kaj sendas al Vjetnamo ekzpoziciojn, teatraĵojn, filmojn. Ĝi provizas multajn stipendiojn por ebligi al Vjetnamaj studentoj eniri Francajn universitatojn. La Franca restas komuna lingvo inter la Vjetnamanoj kaj la Kamboĝanoj. Kiam delegitaro Kamboĝa vizitis Sajgonon, kaj kiam la Vicprezidento Ky vizitis Phnom Penh, la diskutado kaj la fina komunikado estis en la Franca.

## Vjetnamanoj lernas la Anglan

Antaŭ 1954 nur malmultaj Vjetnamanoj lernis la Anglan. Vjetnamano diris al mi: "Ni kredis, ke Parizo estas la kultura centro de la mondo; ke estas nenio lerninda en aliaj lokoj kaj per aliaj lingvoj". Sed dum la pasintaj 16 jaroj, pro la influo de la Usonanoj (kaj iomete pro la ekonomia, teknika kaj milita helpo de la Aŭstralianoj, Kanadanoj, Britoj kaj Nov-Zelandanoj) la Vjetnamanoj komencis studi la Anglan. Oni lernas ĝin nun en la lernejoj, liceoj kaj universitatoj, en la klasoj de la Usona-Vjetnama Asocio, en la Armea Akademio kaj aliaj lernejoj de la Vjetnamaj armeofortoj, kaj per la praktiko en situacio, kie centmiloj da Vjetnamanoj laboras por Usonanoj aŭ vendas al ili. Kaj nun miloj da junaj Vjetnamanoj iras ne al Parizo, sed al Novjorko, Bostono, Toronto, Melburno kaj Londono.

En artikolo en "Esperanto" antaŭ kelkaj monatoj oni priskribis la problemojn de interpretado en ĉi tiu lando. Malgraŭ ke multaj diplomatoj, teknikistoj kaj oficiroj Usonaj kaj Aŭstraliaj lernis la Vjetnaman, plejparte la kunlaboradon de la alianculoj kun la Vjetnama registaro, publika servo kaj armeo dependas de miloj da interpretistoj. Estas multaj tre spertaj lingvistoj, sed neeviteble estas miskomprenoj.

La plej grava fakto, tamen, estas, ke la malfeliĉaj Vjetnamanoj ĉiam havas tiun dilemon — ilia lingvo ne donas aliron al la scienco kaj al la moderna teknologio, certe ne al la plej altaj gradoj. Ili lernis la Francan. Nun ili lernas la Anglan. Kelkaj patroj insistas, ke la infanoj lernu la Ĉinan. La Germanoj starigas klasojn por instrui la Germanan.

## Esperanto en Vjetnamo

En Norda Vjetnamo estas granda Esperanto-movado, kiu eldonas multe da propagando. En Suda Vjetnamo estas malgranda grupo. Kiam paco jam venos, Vjetnamo devas esti fertila grundo por la Internacia Lingvo.

## ÅRSMÖTE

Härmed kallas andelsägarna i  
**FÖRLAGSFÖRENINGEN  
ESPERANTO U. P. A.**

till ordinarie årsmöte  
söndagen den 30 maj 1971  
kl. 16.00  
på Hotell Malmen, Stockholm.

Ombud för andelsägande förening skall inlämna fullmakt före årsmötets början. Ärenden enligt stadgarna, § 14.

Styrelsen





#### RUMAN—SVEDA AMIKECO

CORNELIU MANESCU, Eksterafera Ministro de la Rumana Respubliko, prezidento de UNO (elektita de la Generala Asembleo en 1967 por la 22-a sesio), kiu en 1968 vizitis Svedlandon kune kun Ĉefministro Maurer, faris kun sia edzino novan viziton en Stokholmo dum la 16—18 marto. La rumana diplomato intertraktis kun sia sveda kolego **Torsten Nilsson** kaj ĉefministro **Olof Palme** kaj estis akceptita de reĝo **Gustaf Adolf**.



Ni havas tiom da laboro en la kontoro, ke foje mi devas preni kaslibron hejmen vespere.

Jes, ni ne havas facile, Kalman. Foje mi devas preni kun mi la kasiŝtinion hejmen.

#### KOMPUTERO GUSTUMAS RIVERAKVON EN POLLANDO

Nove starigita registara komisiono, sub prezido de s-ro Zdzislaw Tomaj, respondecos pri "protekto al la homa medio" en Pollando. Ĝi kunordigos tiurilatajn laborojn de diversaj ministerioj kaj prizorgos rilatojn kun internaciaj organizoj.

Plej urĝe traktendaj estas la problemoj pri polucio de akvo kaj protekto de la natura medio ĉirkaŭ urbegoj kaj industriaj kompleksoj. Jam de kelkaj jaroj multiĝas uzinoj ĉe riverbordoj: ili nepre bezonas grandan akvoprovizion — sed dank al ili la riveroj fariĝas kloakoj.

Tial do gravas projekto POL-5, kiun entreprenis la Monda Sanorganizo kiel parton de la Disvolviga Programo de UN. Kunlaboras ekspertoj el 19 sciencaj organizoj en Pollando. Dufoje ĉiun minuton tuboj en la riveroj Wisla kaj Odra ensuĉas "plenubuŝon" da akvo, kiun oni tuj analizas. Informojn pri temperaturo, malklareco, enhavo de oksigeno, ktp, oni sendas al komputero ODRA 1003 en Warszawa.

ODRA 1003 kontrolas kaj komparas la informojn: se ĝi rimarkas polucion en iu parto de la riveroj, ĝi tuj atentigas pri tio, kaj krome kalkulas kiom da akvo el kiu lago oni devos kaneli en la riveron por dilui la venenitan akvon.

La 150 kunlaborantoj en projekto POL-5 estas optimismaj: en la jaro 1985 — laŭ ili — versajne restos en Pollando ne pli, ol 70 kilometroj da venenitaj riveroj.

(Laŭ Unesko-novajoj kaj Informa Servo de UEA)

#### Kio estas O.R.E.?

O.R.E. estas organizaĵo, kiu praktikas Esperanton sur scienca kampo — nome la ornitologio. Ĉiuj geesperantistoj kiuj interesigas pri la birdaro aŭ la naturo ĝenerale estas bonvenaj en nia rondo. La jarkotizo estas nur 5.— Kr. kaj por ĉi tiu eta sumo vi eĉ ricevos dufoje po jaro nian revuon "La Mevo". Sendu la jarkotizon al S-ino Luise Karlsson, Telegrafgatan 5, 149 00 Nynäshamn. Ĝirkonto 69 92 61-4.

#### HELSINGÖR 1971

##### 40-jara feria kursarango

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 25/7—1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo kaj por ĉeesti nian 40-jaran jubileon. Prospekto senpage havebla ĉe

**L. FRIIS**

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

**NB.** Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la alterlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 17—23.10 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

# TRA LANDO DE INDIANOJ

av TIBOR SEKELJ

En reseskildring från Sydamerikas djungler.

Just nu utkommen på Esperantoförlaget.

Hft kr. 24: —.

Inb. kr. 30: —.

Moms tillkommer.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Fack

200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5





**DIREKTORO ERIK CARLEN**

(Ytongbolagen, Hällabrottet)

**65-JARA la 15.1 1971**

E. C. estis direkcia Prezidanto de la internacia beton-konstrua entrepreno "YTONG".

Li iĝis Esperantisto kiel gimnaziano dum februaro 1923 kaj estis inter la iniciatoroj de la sveda fako de Kristana Esperanto-Ligo.

Prezidanto de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) dum 1948—1955, poste ĝia vicprez. Redaktis "Dian Regnon" dum 1948—1954.

Kune kun dir. Wensing en Nederl. kaj dir. Vogelmann en Germ., li fondis Instituton por Esperanto en Komercokaj Industrio (EKI) en 1963.

Vicprezidanto de UEA ekde 1964. Estrarano de la Informa Fako de SEF de 1964.

Li kompilis plurajn broŝurojn pri "Ytong" en Esp.

Verkinto de de Sved—Esp-a Gramatiko (1963) kaj tradukinto de pluraj verkoj, i. a. de Hedegård: "Kiel mi uzu mian biblion?" de G. Lundberg: "Kredo pri Dio en la atom-epoko". Li tradukis ankaŭ plurajn religiajn kantojn.

Eldonis la verkon de Hoog: "Du malsanoj en Esp."

Ide-kreinto de la "Semajno de Amikeco" kiu jam fariĝis tradicio en Esperantujo, kaj de La Esperanto-Fondaĵo (Esperantostiftelsen).

Eminenta religia oratoro (predikanto).

Li gvidis multajn Esp-ajn kursojn kaj interpretis al la sveda lingvo plurajn eksterlandajn esp.-prelegistojn, i. a. ankaŭ la nunan literaturan redaktoron de "La Espero" (en Örebro, 1929).

Postfeste ni deziras dibenitan, longan vivon en sano kaj prospero al nia multmerita Samideano, same al lia ĉarma Esp-ista Edzino kaj vigla filo (denaska Esp.-isto).

Obo/Jo Iu

Sandor Szalay

## KELKAJ VORTOJ PRI LA ESTONTO DE NIA MOVADO

Konstanta zorgo kaj solvenda problemoj estas por nia movado inter aliaj la futuro. Ni povas diri, ke sen junularo ĝi ne havos estonton kaj tio donas por ni la taskon okupiĝi pri la evoluo de la movado; pri tio, ke la nuna stabo de la esperantistaro havu posteulojn, por kiuj ili povu transdoni la stafetbastonon, por pluenkonstrui la organizon de unu el la plej noblaj ideoj.

Estas bedaŭrinde, ke la junularo ne montras tiel grandan interesigon al tiu ĉi ideo, kiel ĝi meritus, kvankam la esperantistaj centroj kaj societoj faras konstante propagandon, ĉiam pruvante la utilecon de nia lingvo.

Sed ankaŭ estas sendube, ke la kultura vivo enhavas multajn aliajn temojn interesajn, kiuj povas okupi la interesigon de la homoj, samtiel tion de la junularo, kaj abunde ili povas elekti el tiuj la plej plaĉan, plej konvenan tiel por profesia, samkiel por amuzigaj celoj. Do, se ni deziras, ke pli efike ni povu vekti la atenton de la homoj pri ni, ni devas konstante serĉi la eblecojn tiucele.

Miaj pensoj koncernas pleje la junularon.

Niaj tagoj ege montras la sopiron de la homoj por vojaĝi en kaj eksterlande, ekkoni la mondon, homojn k. t. p. kaj tiu ĉi sopiro eĉ evoluas. Por atingi tiun ĉi celon antaŭ multaj homoj staras kiel proksima celo la aŭtomobilo. La vojaĝantoj grandparte estas junuloj. **Facile ni povas pruvi, ke tiu, kiu havas aŭtomobilon, intencas vojaĝi eksterlanden, nepre bezonas la internacian lingvon!**

Laŭ mia opinio povus esti efika afiŝo, sur kiu estus desegnita aŭto, apud ĝi la teksto: "Se Vi vojaĝos eksterlanden, ne montradu kiel surdmultulo, sed ellernu la internacian lingvon: Esperanton!" — nature naci-lingve.

Ni jam multe parolis pri tio ke per nia lingvo facile ni povas krei internaciajn konatigojn, amikecojn; la amikeco povos montriĝi en multaj

okazaĵoj de la vivo kaj tiel ankaŭ en la plej grava mondmovado: por la paco.

La plej granda valoro estas por la homoj — krom la sano — la paco, — kaj ne estas pli granda kulpo kontraŭ la homaro, ol la milito! Kaj en la milito plej multon perdas la junularo, kiun la registaroj devigas soldatservi, batali kontraŭ nekonataj, same senkulpaj homoj, kaj eble frue morti.

Do ĉielmaniere la plej grava tereno de nia laboro estas la vivo de la junularo! Ni devas trovi aŭ eltrovi eblecojn por ke ni povu adeptigi el ili la plej grandan nombron.

Krom la ĉiujare organizitaj kongresoj ni aranĝu junularajn esperantistajn kunvenojn, tendarojn, ĉiujare en alia lando. Komenco jam ekzistas: en Hungario ĉe la lago Balaton ĉiujare oni aranĝas esperantistan junularan tendaron (kun eksterlandaj partoprenantoj el kelkaj landoj), sed ĝis nun ĝi ne havis grandnombran partoprenintaron; ĝin evoluigi estus la tasko grandskale.

Estas kompreneble, ke la landaj asocioj devas fari kontakton kun ĉiuj junularaj organizaĵoj, konvinki ilian gvidantaron pri la utilo de niaj celoj, aranĝi kursojn, akiri internaciajn amikajn kaj sociatajn kontaktojn, por ke poste ni havu sukceson por la mondjunularaj esperantistaj tendaroj.

En la kadroj de la societoj ni malfermu eblecojn por la junularo al diversaj agadoj maskigintaj el ilia penso kaj ni ne devigu ilin nur por sekvi niajn malnovajn kutimojn en la societa vivo.

Elkresku novaj branĉoj el la maljuna, nun jam okdektrijara trunko!

Ne estu ĉiam seriozeco, sed estu laŭtaj la sociataj ejoj pro la rido de la junaj esperantistoj!

Laŭ mia opinio ĉi tiu estas nun nia plej grava tasko, ĉar nur tiam Esperanto havas estonton, se ni havas nun kunlaborantan junularon!

### GUDSTJÄNST

Med anledning av SEF:s årsmöte i Sockholm inbjuder KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) till gudstjänst i Allhelgonakyrkan, Helgallunden, måndagen den 31 maj 1971 kl. 9.30.

Disponent Erik Carlén predikar och Janet Enghardt sjunger.

Till Allhelgonakyrkan kommer man med tunnelbana till Medborgarplatsen eller Skanstull. Därifrån 10 minuters promenad.



## NI FUNEBRAS

Oscar Östling, 80-jara la 1-an de decembro 1970, neatendite mortis la 7-an de januaro ĉijare. Östling estis unu el la iniciatintoj de la nun 21-jara Klubo Esperantista de Trelleborg kaj li ankaŭ estis aktiva membro de antaŭa klubo en Trelleborg. Li estis honora membro de Klubo Esperantista de Malmö, kies prezidanto li estis dum la jaroj 1919 kaj 1924.



Curt Augustsson, Falköping, unu el la ĝemelaj fratoj, kiuj per kantoj kaj muziko amuzis je multaj renkontiĝoj esperantistaj, neatendite mortis en februaro. Ni sincere kondolencas al liaj frato kaj parencoj.

## LONDON-MÄRKET

finns nu att köpa. Använd brevmärket för världskongressen i London 1971. Gör en värdefull reklam. Sätt det på all post.

1 karta — kr. 1:25

3 kartor — kr. 2:75

Insätt likviden på postgirokonto 14 74 29-5 (Sv. Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

## TRISTA STATO DE EDUKO EN AFRIKO

"Ni plej ofte neglektas en niaj lernejoj ĝuste tion, kion ni plej urĝe bezonas en nia vivo". Per tiuj vortoj de Spinoza, s-ro Edmond Dossou-Yovo, dahomea ministro pri eduko kaj kulturo, resumis la "tristan realon" de la lernejoj en sia lando, kaj pli ĝenerale, tra tuta Afriko.

Per kontrasto inter la manko de kvalifikitaj administrantoj en kamparaj regionoj kaj la tromulteco de ĝuste tiuj samaj en la urboj Cotonou kaj Porto-Novo, li reliefigis la urĝan neceson nove trapensi la tradician eduk-sistemon por ĝin adapti al la bezonoj de agrikultura socio.

El 37 000 geknaboj, kiuj komencis unuagradan lernejon en 1968, sukcesos la abituriantan ekzamenon post 13 jaroj nur 245, do 0,7 el cent. Inter la unua kaj kvina jaroj de la unuagrada lernejo, "perdiĝos" 50 centonoj el la geknaboj; inter la unuagrada kaj duagrada lernejoj, 77 centonoj.

Oni nun reformas la eduk-sistemon por ke ĝi taŭgu al la efektiva ekonomio de Dahomeo, kiu estas 85-centone agrikultura. Pro tio, en ĉiuj klasoj "agrikulturo estas ĉiea temo, dum oni instruos matematikon, biologion kaj geografion kun rilato al la medio efektiva".

S-ro Dossou-Yovo menciis la novan universitaton, kiun oni nun konstruas kun helpo de Francujo, Kanado kaj Svislando. "Ĉi-jare" — li diris — "ni esperas lanĉi kursojn pri teoriaj sciencoj, agronomio kaj medicino. Studoj pri literaturo komenciĝos en la studjaro 1971—72. Ni starigas seminarion por estontaj duagrada instruistoj, kaj ankaŭ lingvistikan fakon por studi la lingvojn de Afriko". La nova Universitato de Dahomeo akceptos ĉiajn afrikanojn — el landoj anglalingvaj samkiel el franclingvaj.

## BONVENON AL GOTENBURGO KAJ ... AL LONDONO

La urbo Gotenburgo, mondkonata havenurbo ĉe la sveda Okcidenta Marbordo, tutan 1971 festas sian 350-jaran jubileon. En la kadro de la urba jubileo ni invitas vin al sestaga restado en amika, internacia Esperanto-rondo 29—29 julio. Atendas vin interesa, varia kaj altkvalita programo.

Gustateme okazos komuna ŝipveturo al la 56:a UEA-kongreso en Londono, favorpreze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj.

### INTER

#### Agadgrupo por Esperanto

Box 55028

2-400 53 Gotenburgo

Svedio

Telefona (031) 48 95 97

### P. S.

Mendu ankaŭ novan turistan prospekton pri Gotenburgo en Esperanto, nepre skribante rekte al: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

## KORESPONDI DEZIRAS

16-jara studentino, Rosella Alberti, Via Monterotondo 10, 201 62 Milano, Italio.



← (Laŭ Unesko-novajoj kaj Informa Servo de UEA)

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie  
brulsekure

## YTONGBOLAGEN

Hällabrottet





31 juli—7 augusti 1971  
LONDON, ENGLAND

blir platsen för Esperantovärldskongressen 1971. Givetvis skall Ni vara med. Anmäl Eder därför redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Ryttnästaregat. 12, 217 52 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller England.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

### KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	<i>Till</i> 20/6 1971
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	148: —
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro (MJ)	127: —
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	105: —
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	104: —
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	89: —
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	45: —
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	75: —
8. Blindul(in)o	60: —

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vidarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land), och Adoptaj Gepatroj (helst min. sv. kr. 45: — för barnkongressen — eller det belopp, som Ni kan skänka). Givares namn publiceras. Det är ovanligt få svenskar som observerat dessa fonder. SEF

# La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 15 sv. kr. (poŝtĉeka konto 20 12).

Prezo de anoncoj: 1/1 pago 180: —, 1/2 = 90: —,

1/3 = 60: —, 1/6 = 30: —, 1/12 = 15: —.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanconco: 25-vorta = 4: —, 50-vorta = 8: —.

## SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.  
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 15 kr., junuloj 7 kr.  
familia membro sen gazeto 5 kr.

### ESTRARO

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.  
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 6. g.,  
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,  
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Vicsekretarioj: Bertil Akerberg, Lillsvängen 39,  
126 57 Hägersten. Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.  
Tel. 08/41 78 74.

Franco Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.  
Tel. 08/712 82 91.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,  
126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

### FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7  
Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:  
merkrede 10.00—11.00      ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne  
Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78